

Hodiaŭ: Kaŝaĵo-serĉado

(Renkontiĝu je la 2-a antaŭ Asante.)

Ĉu piratan trezoron vi serĉis dum la infanaĝo? Eĉ ne trovinte ĝin, ĉu vi ĝuis la serĉon? Ĉu vi serĉus trezoron nur por la ĝuo de la serĉo?

Tia estas kaŝaĵo-serĉado. Ĝi estas iom nova sportludo en kiu oni uzas birilon (persatelita lokalizilo—aŭ angle, *GPS*) por konstati sian latitudon kaj longitudon.

Aliaj ludantoj jam lasis kelkajn kaŝaĵojn ĉi tie en la tereno de la universitato. La precizajn lokojn, aŭ “ŝlosilojn”, ili registris por ni en la reto. Jen ekzemplo de tia ŝlosilo:



Iru al 32° 52.995' norde, 117° 14.292' okcidente por komenci tiun ĉi facilan trezorserĉon. La kaŝaĵo estas eta: ĝi enhavas notlibreton kaj preskaŭ nenion alian. Ĝi estas facile trovebla... sed ŝtelpaŝu, ĉar studentoj ofte preterpasas.

Do la baza ludo estas trovi la kaŝaĵon kaj skribi ion en la notlibreton por pruvi, ke vi trovis ĝin. Foje oni deprenas de la ujo bagatelaĵon (fremdajn monerojn, ludiletojn, pinglojn ktp) lasante propran bagatelaĵon por sekvoitoj. Ekde ĝia komenco en Usono antaŭ kelkaj jaroj, la ludo jam disvastiĝas. Nuntempe en la retejo www.geocaching.com troviĝas ŝlosiloj por centmiloj da trezoroj en preskaŭ ĉiuj landoj.

Ĉu tia serĉado estas fakte sportludo? Ĉu oni nur entajpas la ciferojn en la ilon, simple iras rekte al la loko, kaj tujtj prenatas al si la ujon? Kutime ne. Vojoj ne estas ĉiam rektaj, do la serĉanto devas trovi la ĝustan vojon. Foje trezoroj estas eĉ enkavernaj, subakvaj, montsupraj, kaj tre ruze kaŝitaj en neatenditaj lokoj. Foje oni devas unue trovi multajn disajn ŝlosiletojn kaj kombini ilin por trovi la trezoron.

Sed finfine, eĉ se oni ne sukcesas trovi la ĝustan lokon, la serĉado mem povas esti ĝuebla!

[La supran mi adaptis el artikolo de Tom PHOENIX, pasintjara NASKano kaj trezorserĉanto. —Hoss]

Kiel funkcias la Tutmonda Loktrova Sistemo?

GPS (angle: *Global Positioning System*) estas loktrova servo, kiun ĉiuj rajtas uzi senpage—oni devas aĉeti nur la ricevilon, aŭ “birilon”. Tre simpla birilo kostas proksimume 80 usonajn dolarojn.

La sistemo uzas proksimume 25 satelitojn, kiuj ĉirkaŭiras la teron tage po (proksimume) du ĉirkaŭiroj. Ĉiu satelito daŭre sendas radio-mesaĝon pri sia preciza orbito. Preskaŭ ie ajn sur la terglobo, helpe de tiuj signaloj birilo povas kalkuli sian lokon tre precize, kun nur iomete da eraro. La eraro povas esti ĝis 20 metroj, sed kutime ĝi estas inter kvin kaj dek.

Vespera programo: junularaj aferoj

Hodiaŭ mi volas babili denove pri junularaj aferoj. Aparte mi volas diskuti kaj montri retajn rimedojn pri blogoj, babilejoj, skajpo, kaj retpoŝtlistoj. Mi volas retuŝi la proponojn pri kiuj ni jam babilis, kaj ankaŭ mi volas diskuti kiel ni povas organizi nin kiel junaj esperantistoj en Usono (kadre de Esperanto-USA ekzemple, por ke ili kontrolu la burokrataĵajn aferojn). Mi sendos pli detalan tagordon al la morgaŭa *Fasko*. Plej amike,

—Brandon

“Vortoj, Vortoj, Vortoj” —Hamleto

Se vi devus loĝi sur insulo dezerta, kiu(j)n vorto(j)n vi kunportus kun vi? Kiu(j) vorto(j) ege plaĉas al vi? Bonvolu diri al mi aŭ skribi al mi ĉe:

eschor@princeton.edu

(Se vi volus sendi novajn vortojn, kiujn vi elpensis, faru!) Dankon,

—Esther

El la kalendaro...

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	ĵaŭdo	vendredo	sabato	dimanĉo
matene	klaso	klaso	Ekskurso al San-Diego	Ekskurso: butikumi laŭ la promenejo ĉe la plaĝo <i>Mission Beach</i>
post-tagmeze	2 ptm: trezorserĉado!	2 ptm: artpromeno kun Meja		
vespere	6 ptm: USEJ-aferoj	7 ptm: Festo ĉe la domo de David JORDAN	<i>libera</i>	<i>libera</i>
nokte	8 ptm: dancado(?)	<i>libera</i>	<i>libera</i>	<i>libera</i>

AMO A TO MATARILERILERO

(Tradicia meksika infankanto kaj ludo)

La infanaro dividiĝas en du grupojn kaj staras dulinie, proksimume du metrojn for kaj vidante unu la alian. Unu grupo alproksimiĝas al la alia kantante, kaj reiras al la origina pozicio, sekve la alia respondas, kantante la sekvan frazon).

1. Amo a to matarilerilero.
2. Kion volas vi? Matarilerilero.
1. Ni volas helpanton. Matarilerilero.
2. Elektu vi. Matarilerilero.
1. Ni elektas _____ (unu el la membroj de la alia grupo). Matarilerilero.
2. Kiun postenon havus ŝi/li? Matarilerilero.

1. Ŝi/li estus _____ (proponata malagraba okupo). Matarilerilero.
2. Ŝi/li ne ŝatas tiun postenon. Matarilerilero.
1. Ŝi/li estus _____ (proponata agraba okupo). Matarilerilero.
2. Ŝi/li ŝatas tiun postenon. Matarilerilero.

La plej alta partoprenanto manpremas la elektitan infanon kaj "donas" ŝin/lin al la alia grupo, kantante:

"Kun dolor-plena koro, mi nun donas ŝin/lin al vi, Se ŝi/li ne bone kondukas, sur la kapo frapu ŝin/lin"

Ĉiuj infanoj, ĝentile, frapetas la elektitan infanon sur la kapo ("pamba" en la hispana) kaj nun estas la vico de la dua grupo komenci la kantadon kaj la elekton de la dezirata "helpanto". —Mar



La tuta *Fasko* nun haveblas rete! Ĉiutage ni metas la plej freŝan numeron en nian TTT-arĥivon. Vidu ĝin per la jena adreso:

<http://esperanto.org/nask/2008/>

Kalembura kadro



La lasta enigmo estas "kon-certo"
La hodiaŭa estas: ___ - T ___ A